# *Turismo en Kubo kreskas spite al la misinformaj kampanjoj.*




Kiel estis  informite, spite al la kampanjoj organizitaj kaj gviditaj de la usona registaro por haltigi la fluon de turistoj al la insulo, Kubo jam ricevis  tri milionojn da eksterlandaj vizitantoj.

La elekto de tiom da homoj viziti la insulon evidentigas la fidon kaj rekonon al tiu ?i destino, kiu ofertas ne nur naturajn kaj kulturajn alloga?ojn, sed anka? sekurecon, kiel asertas la vizitantoj.

Kubo anta?vidas plu kreski je nombro da ?ambroj kaj en la konstruo de hoteloj, krome, miloj da ?ambroj estas disponeblaj en privataj domoj, kiu estas varianto tre ?atata de multaj individuaj turistoj, dezirantaj gustumi la homan proksimecon.

Oni esperas fine de tiu ?i jaro, ricevi pli ol 4 milionojn 300 mil turistojn. Kompreneble, temas pri granda defio ?ar samtempe ekzistas kampanjoj kaj konkretaj agoj de la usona administracio por timigi eblajn vizitantojn, kaj kaze de usonaj civitanoj ili e? ne rajtas turismi nialande, nur kelkaj specialaj permesoj eblas por ili, krom la timigoj pri sekureco, interalie.

Kompreneble, kompletaj falsa?oj ?iutage distrumpetataj de diversaj usonaj  funkciuloj kaj de la prezidento mem, por eviti  progreson de la insula ekonomio.

Malgra? ?io, la kubanoj laboras por plibonigi siajn turismajn ofertojn kaj servojn, jen por amantoj de naturo,kaj  por aliaj kiuj preferas la maron, a? la kuban kulturon.

La plej popularaj destinoj de turistoj kiam vizitas Kubon estas Havano, la banloko Varadero, la naturparko Viñales en la okcidenta parto de la insulo; en la centro, la kolonia urbo Trinidad, kaj en la oriento estas Santiago de Kubo kaj la urbo Baracoa en la plej ekstrema orienta provinco Guantánamo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/economia/199385-turismo-en-kubo-kreskas-spite-al-la-misinformaj-kampanjoj

**Radio Habana Cuba**